

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Jarabono : 50 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

JANUARO - FEBRUARO

1981 - 1

KULTURAJ KAJEROJ

1981 JANUARO-FEBRUARO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Historio de Andoro A. Ribot

La cirkulero de la Amerika Filozofia societo de 1888 B. Golden

Psalmaro de Utrecht S. Guillot

Kulturo kaj lingvo M. Challulau

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

El Grésillon

Jam de kelkaj semajnoj venis la tempo de la decidoj pri la someraj ferioj. Ĉiutage la leterportisto alportas multajn informpetojn diversajn. Ili plej ofte temas pri la programo, sed ankaŭ multfoje pri tre diversaj punktoj. Mi jam skribis, ke informpetantoj okaze konsideras nin vojaĝagentoj. Tute kompreneble estas, ke samideanoj el iu alia lando venantaj al Francio la unuan fojon deziras precize koni la eblajn vojaĝrimedojn kaj la horarojn. Unua vojaĝo eksterlanden estas ia aventuro. Sed kelkajn informojn ni tamen ne povas doni, aŭ la petanto povas ricevi la respondon en sia propra lando : ekzemple, la prezon de bileto de Milano al Gresillon. La informoj, kiujn ni povas doni koncerne la vojaĝojn al Baugé, temas pri la vojoj irotaj kaj eventuale la horaro. Por la geamikoj, kiuj intencas veni ĉi jare al la Esperanto-Domo jen kelkaj informoj.

La urbeto apud kiu situas la kastelo Gresillon nomiĝas Baugé (Boĵe). Tiu urbeto lokiĝas ĉe la kruciĝo de du grandaj vojoj : Angers-Blois (n° 766) kaj Le Mans-Saumur (n° 23 — n° 138). La aŭtomobilistoj, kiuj venas de la Nordo trapasu Le Mans ; tiuj kiuj venas de la Sud-Oriento trapasu Blois aŭ Tours ; venante de la Sud-Okcidento oni trapasu Angers aŭ Saumur. La vojo, kiu de Baugé iras al la kastelo (2 km) estas n° 817 al Le Lude. Ni esperas, ke ni tiamaniere respondis la plej oftajn demandojn faritajn de la aŭtovojaĝantoj. Ni aldonos, ke pagaj aŭtoŝoseoj ekzistas inter Paris-Le Mans, Paris-Tours, Nantes-Angers.

Nun ni pensu pri la uzantoj de la vagonaroj. Antaŭ dudek jaroj ekzistis vagonaro de Le Mans al Saumur, kiu haltis en Baugé. Ĝi estis anstataŭita de aŭtobuso, kiu iras la saman vojon kaj apartenas al la Fervoja Kompanio S.N.C.F. Vi rajtas aĉeti bileton de iu ajn loko ĝis Baugé. Tiu fakto ne estas konata de ĉiuj stacidejorantoj. Vi devas insisti. De kie ajn vi venas pli bone estas alveni en Le Mans aŭ Saumur. Kie atendas la aŭtobuso ? En Saumur ĝi staras antaŭ la stacidomo (direkto : Le Mans). En Le Mans ĝi atendas ĉe la ekstremo de la stacidomo ; oni iru sur la unua kajo, maldekstren kiam oni rigardas al la konstruaĵo. La aŭtobuso staras sur haltejo (direkto : La Flèche-Saumur). De kie ajn vi venas via vojaĝo finiĝas en Baugé ĉe la stacidomo (franclingve : gar). Tie atendos vin aŭtomobilo se vi sufiĉe frue informis nin. Kelkafoje, de Parizo oni direktas vin al Angers. Tiu vojo estas pli longa, do pli kosta. De Angers vi devos uzi aŭtobuson de privata kompanio, kiu ne veturas dimanĉe nek festotage.

Eble ni forgesis kelkajni nformojn. Ni tamen esperas, ke la supraj linioj forprenis iom de la eventualaj angoroj de niaj baldaŭaj vizitantoj. Ĉiukaze tiuj devas tre rapide aliĝi ; meze de januaro ne plu restas libera ĉambro sur la unua etaĝo por la unua. periodo.

Ĝis baldaŭ. Sed rapidu !

Esperanto tra la Mondo

La kongreso en Brazilia :

— Kiel alta protektanto de la 66a Universala kongreso rolos la prezidento de Brazilo, S-ro Joao Figueiredo.

La prezidanto de la loka kongresa komitato estas vicestro de la reganta partio en la brazila senato, José Lins, multjara esperantisto.

— Respondecas pri eksterlanda informado la konata esperanta poeto Roberto Nogueira, aŭtoro de « Vojo kaj vorto ».

— En la kadro de la preparo de la kongreso, okazis dum Decembro, esperanto semajno, kun, interalie, intervjuo en televido.

— La brazila poŝta administracio emisios specialan poŝtmarkon okaze de la kongreso.

— La temo de la kongreso estos : « Kulturoj kaj lingvoj : pontoj kaj baroj ».

La eŭropa parlamento enketos pri Esperanto :

Akceptante la konkludojn de la « raporto Patterson », en rilato kun propono de rezolucio de belga parlementano, S-ro Coppieters, la eŭropa parlemento starigis laborgrupon en kiu kunlaboras la eŭropa esperanto-centro, pere de ĝia direktoro (kaj nuna prezidento de U.E.A.), Gregoire Maertens. Interalie, la laborgrupo devos enketi pri la taŭgeco de Esperanto por solvi la lingvajn problemojn en la instancoj kaj en la lernejoj de la dek landoj de la komunumo.

Nova dulingva teatra trupo :

Fondiĝis en Figeac (Francio), « La krizalido, teatro internacia de Akvitanio », kun la celo organizi spektaklojn en Esperanto kaj en la franca. Adreso : « La krizalido », S. Gaspard, 15, rue Clermont, F-46100 Figeac.

Esperantisto parolis dum la ĝenerala konferenco de U.N.E.S.K.O. :

Dum Oktobro, le ĝenerala konferenco de U.N.E.S.K.O. kunsidis en Beogrado. Aparta zorgo estis donita al la temo de la komunikado. En tiu speciala diskuto, S-ro Tibor Sekelj, reprezentanto de U.E.A., havis okazon paroli pri Esperanto dum dek minutoj.

Li proponis al U.E.A. uzi la estontajn tri jarojn, antaŭ nova konferenco, por intensa preparado de konkreta propono.

La franca muzeo pri Esperanto :

Ĝi estas instalita en la franca urbeto Gray, en departemento Haute-Saône, en orienta parto de Francio. Adreso : « Maison pour Tous », 19, rue Victor-Hugo, 70100 Gray. Ĝi estas malfermita merkrede kaj sabate de la 15a ĝis la 18a, sed vi povas alitempe viziti se vi rilatas kun la respondeculo, S-ro Géo Junier, 87 bis, faubourg des Perrières, en Gray. Tél. : (84) 65-11-73.

Dua propono de leĝo en la franca parlamento :

Lasttempe, propono estis deponita por oficiala akceptado de Esperanto inter la fakultativaj lingvoj de la duagrada kaj supera instruado en Senato de S-ro Francis Palmero.

En la franca televido :

La 5a de Decembro, la franca televido, en la varieta elsendo : « Quatre Saisons », prezentis dum kelkaj minutoj la internacian lingvon kun la partopreno de la esperantista kantisto Jack Le Puil.

Deklaracio por Esperanto en Monda Turisma Konferenco :

La fina deklaracio de la Monda Turisma Konferenco, kiu kunvenis en Manille, komence de Oktobro, entenas parton favoran al Esperanto. Ĝi substrekas la gravecon de la kono de la lingvoj, « ĉefe de tiuj kun universala alvokiĝo kiel Esperanto ».

Mortis fama esperanta verkisto :

Jan Fethke (Jean Forge), konata esperanta verkisto kaj filmreĝisoro, aŭtoro, interalie de la romanoj « Abismoj », « Mr Tot aĉetas mil okulojn » (poste tradukitaj en pluraj lingvoj), mortis fine de Decembro en Berlino.

Amasaj kursoj por profesoroj en Irano :

Dum lasta somero, okazis amasa rapida kurso por 675 geinstruistoj en Teherano. Aliaj kursoj komenciĝis poste. Ampleksa esperanto-persa vortaro aperis.

Kien iri en 1981 ?

— La Nacia Franca Kongreso (U.F.E.) okazos en Perpignan de la 5a ĝis la 9a de Junio. Adreso : Centre Culturel Esperantiste, 72, avenue du Général de Gaulle, 66000 Perpignan.

— La internacia kongreso de S.A.T. okazos en Bazelo (Svislando) de la 1a ĝis la 8a de Aŭgusto. Adreso : E. Döring, SAT-kongreso, Poŝtfako 225, CH-4003 Basel.

— Junulara kongreso de T.E.J.O., 10a-17a de Julio, en Oaxtepec, Meksikio. Adreso : 37a I.J.K., Apartado Postal M-9310, Mexico, 1 DF, Meksikio.

— Komuna kongreso katolika-protestanta (I.K.U.E. - K.E.L.I.) en Nederlando, Konferencejo « De Bron », inter Dalfsen kaj Ommen. 25a de Julio - 1a de Aŭgusto. Adreso : w. Krikke, pk 104, NL 2240 AC Wassenaar.

— Fervojista kongreso en Regensburg (Germanio). 15a - 21a de Majo.

— SAT-Amikara kongreso en Saint-Jorioz, apud Annecy, 16-a - 20a de Aprilo. Adreso : S. Sire, 16, chemin de l'Abbaye, 74000 Annecy-le-Vieux, Francio.

Multegaj aliaj renkontoj atendas vin en tuta Eŭropo. Informiĝu.

Historio de Andoro

Spite al sia malfacila alireblo, Andoro estis enloĝita, jam ĉe la unuaj epokoj de la homaro. En la regiono de La Massana, oni trovis restaĵojn de objektoj el la epoko de la polurita ŝtono. Oni ankaŭ vidas rokojn, ŝajne starigitajn de homaj manoj, krudajn menhirojn honore al oni ne scias kiu diaĵo.

Ĉirkaŭ tri jarcentoj antaŭ Kristo, la romianaj legioj marŝantaj al Iberio, verŝajne uzis ĝiajn intermontojn, sed lasis neniun postpruvon pri sia trapaso.

La romania historiisto Plinio la Maljuna aludas en siaj skribotabuletoj, pri nomada popolo, kiun li nomas « Andorrisoe » kaj kies loĝlokon li indikas apud Kadizo, proksime de la kolonoj de Herkulo. Oni supozas, ke tiu migrema popolo instaliĝis en la landon, al kiu ĝi donis sian nomon. Sed, krom tiu nomsimileco, nenio ebligas certigi tiun tre diskuteblan supozon.

Laŭ aliaj, la origino de la popolizado estus pli malfrua ; ĝi eble datumas de Ludoviko la Dolĉanima kiu, venkinte la Maŭrojn ĉe la Massana, estus disdoninta al siaj soldatoj terbienojn kaj impostprivilegiojn, kondiĉe ke ili agnosku lin feŭdoĉefo. Tiutempe, Andoro estis parto de la Kataluna provinco kaj, ĉe la packontrakto de Verdun, ĝin aneskis la Okcidenta Imperio.

Post sia konkero de la iberia duoninsulo, la Maŭroj okupis la landon dum multaj jaroj. Ili postlasis grandnombrajn signojn pri sia paso. Norde de Encamp, oni vidas la ruinojn de unu el iliaj turoj, nomita « Castell dels Moros » ; norde de Ordino, kaj ĉe Sant Julià de Loria, la ruinoj de du el liaj kasteloj ; apud Les Escaldes, oni malkovris unu el iliaj tombejoj. Kelkaj esprimoj de la andora vorttrezoro similas al arabaj terminoj ; sed, pli ol tiuj senvivaj signoj la legendo pri Karlo la Granda restis plenviva ĝis hodiaŭ en la Andoraj Valoj.

Ĝi informas nin, ke la « imperiestro kun floreca barbo » trairis la Valojn, persekutante la Saracenojn. Al la turistoj, oni montras la trogon de lia ĉevalo, sur la bordoj de Valira, en Engordany...

« ... Enirinte tra la intermonto de Fontargente, lia armeo supozeble venkis la malfidelulojn ĉe La Massana ». « Kaj la senmovaj montoj eble resendis la potencajn sonojn el la olifantoj de liaj prodoj. La sonora nomo Andoro eternigis por ni ties lastan eĥon ».

Nur tio estas pruvita kaj rajtas partopreni en la Historio, ke Ludoviko la Dolĉanima, en la jaro 802 a, agnoskis rajton pri dekonimposto super la Valoj, al la episkopo Poseidonio, en protokolo nomita « ĉarto » deponita kaj konservata en la katedralo de La Seo d'Urgell.

Ĉu tiu skribaĵo estas aŭtentika ?

Male, ĉu la Urgellaj episkopoj, dum la malpaco ekestinta inter ili kaj la grafoj de Foix (fŭa), ne intencis krei dokumenton siaprofite ? Ambaŭ hipotezoj ricevis favorajn argumentojn, sed sen certa decido.

En la jaro 843, Karlo la Kalva forvendas siajn rajtojn super Andoro al Siegfried, grafo de Urgell. Sed la grafoj de Cerdagne pretendas ke ankaŭ ili posedas rajtojn. En la Xa jarcento, ili konfliktas kum Radulfo, episkopo de Urgell.

Tiu luktado daŭros dum la XIIIa jarcento inter la episkopo Arnaldo de Prexens (preksens) kaj la gento de Foix, kiu, interdume, herede ricevis la rajtojn de la gento Castelbon-Caboèt. La civila milito flamiĝas en la valoj ; ambaŭ partioj disputas pri la regado, sen definitivaj rezultoj. Nur fine de la XIIIa jarcento, oni atingos akordon aranĝitan laŭ la propono de Petro la IIIa, Reĝo de Aragono kaj de la Episkopo de Valencia.

Akton nomitan « Parrajto » oni subskribis : ĝi reguligos por venonteco la rajtojn de ambaŭ partioj. Ankoraŭ nuntempe, de tiu Parrajto estas inspirita la politika statuto de la Andoraj Valoj.

Laŭ tiu akordo, la grafoj de Foix kaj la episkopoj de Urgell ricevas definitivan konfirmon pri siaj feŭdoĉefeco kaj privilegioj. Ĉiun duan jaron, ili rajtas postuli tributon nomitan « Quistia » (kistia) de sia vasalo. Ili rajtas edikti ordonojn kaj surpreni la titolon de Kunprinco, kiu defenitive validigas ilian rajtegalecon. Kondiĉe de ĉiujara ĵuro pri fideleco kaj subeco, la Andoranoj ricevas gravajn privilegiojn por la disvendo de siaj produktoj kaj por la komerco kun siaj najbaroj.

La Parrajto de 1278 ricevas konfirmon en 1288, pere de buleo de la papo Marteno la IVa. La ribelo kvietiĝas kaj la lando eniras paceraon, kiu jam de 650 jaroj, neniam ĉesis.

Sed, dum la rajtoj de la episkopoj de Urgell transdoniĝis ĉe ĉiu elekto, al lia posteulo, tiuj de la Grafoj de Foix venis herede al la reĝo de Navarre. Henriko la IVa alportis tiun modestan floreton al la krono de Francio. Tra la eventoj, kiuj konsistigas la historion de la franca nacio, la feŭda titolo de « Kunprinco kaj feŭdoĉefo de Andoro » kuŝas sur la tre demokrata kapo de la Prezidento de la Franca Respubliko, kies dediĉita fotografaĵo troviĝas apud tiu de Monsinjoro la Episkopo de Urgell en la Domo de la Valoj en Andorra.

La tumultado de la franca Revolucio, dum momento, minacis tiun situacion. Inter aliaj privilegioj, tiu titolo kaj la « Quistia » estis abolitaj de la Konvencio. Sed la fidela Andoro, petinte de

Napoleono la revalidigon de la interrompitaj tradicioj, ĉi tiu restarigis la feŭdajn rilatojn. Per la dekreto de la 26a de Marto 1806, li fiksis la « Quistia » je 960 frankoj pojare kaj li difinis, kiel konstantan delegiton de sia persono en la Valoj, Vigieron komisiitan plenumi lianome iujn administraciajn kaj juĝajn funkciojn, pri kiuj ni baldaŭ parolos.

Andoro, kun siaj senŝanĝaj tradicioj, nemulte evoluis depost la Parrajto de 1278. Sekve de siaj malfacilaj rilatoj kun la eksterlando, de sia neriĉa grundo, kiun neniu invadanto povus deziri, pro la simpleco de la vivkondiĉoj de siaj loĝantoj, ĝi restis la sama, dum en Eŭropo, fariĝis kaj malfariĝis la regnoj.

Tamen, la liberamaj ideoj de la XVIIa jarcento disvastigitaj de la Franca Revolucio, penetris ĝis ĝi. Komence de la XIXa jarcento, formiĝis partieto, kiu deziris, ke la andoraj institucioj fariĝu malpli ordonemaj kaj patriarkaj.

La aŭtoritato de la « Konsilio de la Tero » balotita ĉiun duan jaron, de la limigita voĉdonado de la familiestroj, estis nevolonte obeata de la « junuaj Andoranoj ».

Manifestacioj okazis. Post longa hezitado, delegitaro estis difinita por precizigi tiujn aspirojn, pristudi reformprojekton, ĝin redakti kaj prezenti al la Kunprincoj por ke ĉi tiuj povu modifi la iaman konstitucion, validan depost la XVa jarcento. La episkopo de Urgell, pli alirebla, akceptis tiun projekton, al li prezentata de la sindiko Guillermo Plandlit, ĉekape de delegitaro en 1866 ; sed, pro la malproksimeco de la franca Kunprinco kaj pro la malinklino de Napoleono la IIIa al problemoj, pri kiuj senhezite zorgis Napoleono la I-a, la projekto estis definitive akceptata nur en 1868, post la entrudo de gravaj modifoj, kiuj malpliigis ĝian trafpovon.

Obee al tiu reformo, la Konsilion de la Tero anstataŭis la Ĝenerala Konsilio de la Valoj, balotota por kvar jaroj anstataŭ du kaj renovigebla poduone, ĉiun duan jaron. La nombro de la konsilianoj estis reduktita ĝis dudek-kvar, po kvar por paroko ; sed ilin daŭre balotis la familiestroj. Tamen ricevis la voĉdonrajton la reprezentantoj de la nevoĉdonantoj t. n. « comissionats », nomumitaj po du en ĉiu paroko.

Nur en 1933 post nova kampanjo de la partio « Andorana Junularo » kaj pro timo de ribeloj, kiuj efektive okazis, la kunprincoj anstataŭis la limigitan voĉdonadon per la universala voĉdonado ; ek de la 5a de Aprilo 1933, rajtas voĉdoni ĉiuj virsekaj andoranoj, pli ol 25-jaraj kaj kutime restadantaj en Andoro ; estas elekteblaj ĉiuj Andoranoj pli ol 30-jaraj kiuj, nek kriplaj, nek drinkemaj, posedas sufiĉe da bienoj por eventuale kompensi malprosperan administradon de la publikaj aferoj.

En tiu mallonga historia raporteto, ni ne povas prisilenti la « grandan eventon » kiu estis la konstruado de la nacia vojo, trairanta la Valojn ek de 1934. Igante tre facile alirebla tiun landon, ĝis tiam fermita kaj misterplena la vojo profunde transformis la vivkondiĉojn de la loĝantoj. Granda hidroelektra uzino kun francaj kaj hispanaj kapitaloj, en la sama epoko, kunportis komforton kaj atentindajn enspezojn al la princlando.

La dissendilo Radio-Andorre estis inaŭgurita la 7-an de Aŭgusto 1939 de la franca Ministro de Monzie. Ĝi alportis la lasttempan detalon de la modernismo kaj konigis Andoron mondskale.

Fine, oni ne forgesu la tre humanan rolon luditan de Andoro, dum la lastaj dek kvin jaroj. Tiu lando akceptis, gastigis kaj flegis grandan nombron da ĉiunaciaj rifuĝintoj, kiuj deziris trovi ŝirmejon for de la hazardoj de la militoj kaj de la revolucioj.

Se oni opinias neampleksaj, la eventojn de ni ĵus priskribitajn kompare kun la kataklismoj, kiuj periode konfuzigas la mondon, oni bonvolu memori pri la proverba difino de feliĉa popolo kaj agnoski, ke, skribante historion, estas preferinde lasi blankajn paĝojn aliloke tre ofte makulitajn per sango.

A. RIBOT.

VENONTAJ OKAZAĴOJ EN GRESILLON

29/3 — 5/4

— Internacia renkonto de infanoj.

— Praktika pedagogio.

(programo kontraŭ respondkupono !)

1-2-3/5

— Pedagogia seminario organizita de U.F.E.

UNUA SOMERA PERIODO PRELEGOJ

Ni jam povas anonci la jenajn titolojn :

— Islando.

— La Kanariaj Insuloj.

— La Oriento antaŭ la sojlo de la Okcidento.

— La originoj de Eŭropo.

kun lumbildoj

prezentitaj de **HUGO ROLLINGER**

(sekvo de la titoloj aperos en la venonta numero)

Gesroj Babin dankas la multajn geamikojn, kiuj sendis al ili bondezirojn okaze de la nova jaro. Ili dankas ilin kaj petas pardonon, ke ili ne povas respondi al ĉiuj. Ili estis kortuŝitaj kaj elkore reciprokas la bondezirojn.

LA CIRKULERO DE LA AMERIKA FILOZOFIA SOCIETO DE 1888

Bernard GOLDEN

En la jaro 1887 estis organizita komitato de membroj de la *American Philosophical Society* (Amerika Filozofia Societo — AFS) en Filadelfio, Usono, kies tasko estis esplori la demandon pri la kreo de internacia lingvo. La tri membroj de la komitato estis Henry Phillips, filo (1), filologo kaj numismato, David G. Brinton, etnologo kaj lingvisto, kaj Monroe Snyder. La tri kleruloj komencis analizi jam publikigitajn lingvoprojektojn kaj taksis ilin en raportoj eldonitaj de AFS. La unua lingvo, kiu estis profunde ekzamenita estis Volapuko, kiu estis plurflanke kritikita de la komitatanoj.

En januaro 1888 AFS ricevis ekzempleron de la franca traduko de la « Unua Libro » de d-ro Esperanto, eldonita en novembro 1887. Tiu ĉi verko ricevis favoran traktadon, ĉar la komitatanoj rimarkis, ke d-ro Zamenhof donis al sia lingvo plurajn trajtojn, kiuj koincidis kun la planlingvaj principoj formulitaj de la usonaj lingvistoj sendepende de aliaj projektoj.

Solvenda enigmo por historiistoj de la Esperanto-movado estas jena : kiel Zamenhof informiĝis en 1887 pri la okupiĝo de AFS pri internaciaj lingvoj.

En la arkivejo de AFS troviĝas cirkulero datita la 12-an de marto 1888, temanta pri la kreo de internacia lingvo. La dokumento estas en la formo de presita letero subskribita de Frederick Fraley, la tiama prezidanto de AFS. Jen mia Esperantigo de la angla teksto.

> « Aŭlo de la Amerika Filizofia Societo
> Filadelfio, la 12-an de marto 1888.

Ĉe kunveno de la Societo, okazinta en Filadelfio la 6-an de januaro 1888, la sekva rezolucio estis adoptita :

Estis decidite, ke la Prezidanto de la Amerika Filozofia Societo estu petita adresi leteron al ĉiuj klerulaj organizaĵoj, kun kiuj tiu ĉi Societo havas oficialaj interrilatojn, kaj al tiaj aliaj societoj kaj individuoj, kiujn li opinias taŭgaj, por peti ilian kunlaboron perfektigi lingvon por kleraj kaj komercaj celoj, bazitan sur la arja vortprovizo kaj gramatiko en iliaj plej simplaj formoj ; kaj por proponi tiucele internacian kongreson, kies unua kunveno estu aranĝita en Londono aŭ Parizo.

Konforme al tio, mi nun havas la honoron transdoni ĝin por via konsidero, kaj inviti vian kunlaboron por efektivigi la celon, al kiu ĝi rilatas. Por ke la vidpunktoj de nia Societo, kiuj kondukis al la adopto de la rezolucio, estu komprenitaj, mi akiris la permeson sendi ĉi-kune ekzemplerojn de la Raportoj de la Speciala Komitato, al kiu la temo de plano por universala lingvo estis direktita fare de la Societo.

Vi konstatos, ke la rezolucio de la Societo ne konformas ĝislime kun tio konsilita de la komitato, sed la temo havas tiel vastan intereson, ke ĝi estas altgrade inda je la plej ampleksa ekzameno. Mi, do, petas por ĝi vian baldaŭan kaj favoran konsideron, kaj petas, ke via decido estu komunikita al mi, kaj, se favora, ĉu vi preferas la aranĝon de la konferenco en Londono aŭ Parizo, kaj ankaŭ indiku la nombron de la delegitoj, kiujn ĉiu societo sendu.

Post ricevo de decidoj de la diversaj organizaĵoj, kun kiuj ni korespondas, mi kunvokos la konferencon.

Tre respektplene via,

(subskribita) Fred. Fraley, Prezidanto ».

Tiu estas la fama cirkulero de AFS menciita en historioj de Esperanto kaj la internacilingva movado. Postaj eventoj montris, ke la meritplena entrepreno de AFS estis antaŭtempa kaj iom tro optimisma.

Zamenhof detale informiĝis pri la projektita kongreso, ĉar la 10-an de aprilo 1888 li skribis al Henry Phillips, dankante lin pro la raporto pri Volapuko kaj donante sian plenan konsenton al la Kongreso rilate la faradon de ŝanĝoj en Esperanto. La aŭtoro de Esperanto mencias la cirkuleron de Prezidanto Fraley en la « Aldono » de la *Dua Libro de l'Lingvo Internacia.* Denove estiĝas demando : kiel Zamenhof eksciis pri la enhavo de la cirkulero de Prezidanto Fraley ? Ĉu Phillips, kiel sekretario de AFS, sendis ĝin persone al li, aŭ ĉu iu klerulo en Varsovio, eble ĉe la universitato atentigis Zamenhof pri la alvoko.

La dua suplementa raporto de la komitato de AFS, prezentita en decembro 1888 kaj eldonita en januaro de la sekva jaro, sciigis inter aliaj aferoj, ke pro manko de amasa subteno, la kongreso ne povas efektiviĝi. Zamenhof jam antaŭvidis tion en la « Aldono » de la *Dua Libro* (1888), kaj li klarigis en *La Esperantisto* en 1889, ke la fiaskinta kongresa kunvoko rezultis de la indiferenteco de instruituloj.

Povas esti providence, ke la kongreso de AFS ne okazis. La interesiĝo pri internacia lingvo ĉe tiamaj klerulaj organizaĵoj estis tro malvasta, kaj la tempo ankoraŭ ne estis matura por decidi pri tiel grava afero en kongreso. Plej verŝajne la tiutempaj delegitoj estus farintaj tiom da ŝanĝoj en Esperanto, ke ĝi apenaŭ estus povinta ĝisvivi. Se la esperantistoj ne havis okazon kandidatigi sian lingvon en tiu neokazinta kongreso de la 1880-aj jaroj, ili ne bedaŭru tion, ĉar ili ankoraŭ havas sian lingvon hodiaŭ.

---

(1) Por biografiaj informoj pri Henry Phillips, vidu mian artikolon « Henry Phillips, Jr. (1838-1895) - la unua esperantisto en Ameriko », **Israela Esperantisto,** 1980, n-ro 71, aprilo, p. 4-6.

PSALMARO DE UTRECHT (10-a jarcento)

La Psalmaro, preĝlibro, servis por preĝi, por mediti sed ankaŭ por perfektigi la lego-rudimentojn de la psalmanto. Kvankam estas malfacile bildigi tiujn poeziajn tekstojn, ofte abstraktajn, la psalmaroj estis tre multaj. La Karolida Psalmaro de Utrecht (nun en la Universitata Biblioteko de tiu urbo) estas unu el la plej famaj.

Laŭ tri kolonoj, la teksto estas el belaj arkaikaj kapitaloj. Harmoniaj bildoj superas la tekston kaj okupas la tutan larĝon de la paĝo. En la dekoro, kiu elvokas la Kreadon de la ĉielo, de la montoj, de la oceanoj, apud la muroj, kiuj protektas la sanktan civiton, ripozejon kaj feliĉejon, vivas vegetaloj, bestoj, homoj (virinoj, viroj, infanoj, almozuloj, malsanuloj, princoj, soldatoj). Malofte la scenoj estas de kristana inspiro.

Cetere pli ol bildoj de la 9-a jarcento, ili estas klišoj el Antikveco : jen la kvar laboristoj, kiuj, Pompei-maniere, klopodas ĉe apreturota ŝtofo ; jen la manĝo en muziko, kie la manĝantoj kuŝas sur lito apud ronda tablo ; la orgeno estas romia kaj la « aŭloso » estas greka. Mallertaj estas la perpektivoj ; neniu ombro por akcenti la reliefon aŭ krei atmosferon. Malmulte esprimaj estas la vizaĝoj ; alte tenita kapo montras ordonon ; la kapo leviĝas por petegi la mastron ; ĝi antaŭeniĝas por indiki dialogon ; ĝi kliniĝas sur la bruston por montri malvenkon aŭ malesperon. Tamen, per nervaj plumstrekoj, la artisto akcentis la gestojn de la manoj, la teniĝon de la torso, la drapiron de la vestojn, la irmanieron, la direkton de la rigardo. Dum jarcentoj tiu manuskripto inspiris la mezepokajn artistojn.

ANGLO-SAKSA MINIATURO

Biblio kun bildoj (nun en British Museum) estis ellaborita en Cantorbery, en la unua duono de la 11-a jarcento ; ĝi abunde ilustras la ses unuajn Librojn de la Malnova Testamento ; ĝi entenas 550 ilustraĵojn ; ĝi estas la plej ilustrita libro de Mezepoko ; ĝi estas kopio de originala verko.

La scenoj de tiu Biblio tute similas tiujn, kiuj figuras sur la Tapiŝo de Bayeux : sur ambaŭ ĉefverkoj oni trovas samajn vestojn, samajn ilojn, samajn laborojn, kiuj spegulas la eventojn, la modojn, la kutimojn, la ekipaĵon de la tiama Cantorbery-regiono. Adzo ĉe mano, Noe (Noa) konstruas sian arkeon ; en ties ekstremaĵoj staras la drakoj de la drakŝipoj ; per sia ŝtonĵetilo kampulo pafas la birdojn : kaj ĉirkaŭ vinpremilo, oni klopodas (ĉar tiam Anglujo faris sian vinon) ; jen la plugilo kaj la jungilaro de la ĉevalo detale desegnitaj ; la ĉaro kun sia rudimenta pendigilo, kiu kondukis la familion de Josefo en Egiptujon, estas tiu, kiu, en la kamparo, transportis vojaĝantojn kaj varojn.

La 11-jarcentaj predikantoj tondris kontraŭ la lukso de la aristokrataro. La Biblio de Cantorbery montras tiun lukson en la armiloj, la teleraro, la vestoj, la ŝtofoj, la juveloj. La tapiŝoj, la drapaĵoj, la kurtenoj, kiuj ornamis murojn, litojn kaj sidilojn estis grandvaloraj kaj oni ilin heredigis per testamentoj.

La anglo-saksaj brodistinoj lerte elfaradis la vestojn, kiuj estis tinkturitaj de kosta purpuro, kaj plibeligitaj per delikataj oraj borderaĵoj. La riĉaj virinoj portis oran bendon ĉe la frunto kaj broĉojn, plektaĵojn, kolierojn el oro. La armaĵoj de la viroj, la spadoj, la ŝildoj ankaŭ brilis je oro. Sur la tablo-tuko teleroj, pokaletoj, trink-kornoj ; seĝoj estis garnitaj je oro aŭ arĝento. Ĉio tio ĉi figuras en la Biblio de Cantorbery. Sed ankaŭ, por puni la krimulojn, la pendumilo garnita de eskalrungoj por faciligi la laboron de la ekzekutisto.

CITEAUX-CISTERCIO

La 21-an de marto 1098, Robert de Molesmes, kun kelkaj monakoj, fondas la abatejon en Citeaux. Tiuj monakoj, iom aĝaj, deziris plej rigore praktiki la Benediktan Regularon. Serĉe al perfekta monakejo, ili multe vojaĝis kaj vizitis diversajn abatejojn. Ili latinlingve parolis kaj kunportis kun si antikvajn legendojn, de tre diversaj inspiroj. Tial sur la manuskriptoj de Citeaux oni trovas Centaŭrojn, zoomorfajn personojn, batalojn de sovaĝaj bestoj. La Bizanca arto inspiris la mozaikajn bendojn kaj eĉ la vorton « Theotokos » por nomi la Virgulinon. La koptaj kaj arabaj literoj, misformitaj kaj allinigitaj, formis borderaĵojn. Irlando sugestis la multajn plektaĵojn.

En Citeaux, rapide, la kopiistoj komencis manuskriptojn. En 1099 3-voluma Biblio estis finita ; ĝiaj miniaturoj, kelkfoje tro abunde multiĝis kaj riĉiĝis. Al la inicialo ornamita kaj historiita aldoniĝis, en la marĝeno aŭ interne de

la teksto, scenoj religiaj aŭ laikaj. Se Dio, la Anĝeloj, la Apostoloj portas la antikvan robon, la aliaj personoj havas la mezepokajn vestojn ; jen la tuniko, ambaŭflanke fendita, kiu lasas vidi la pantalonon kelkfoje buntan ; la militistoj portas la maŝkirason, la kaskon kun la nazprotektilo kaj la grandan ŝildon pintan je sia bazo ; tiuj ŝildoj estas malsame pentritaj : jen la bendo, la ĉevrono, « le parti, le bandé, le contrebandé » ; estas la unuaj signoj de heraldiko.

En la « Moralia in Job » de Gregorio, finita en 1111, temas pri scenoj de la ĉiutaga vivo, plenaj je vervo kaj karikaturoj. Ni rigardu : La majuskla **I** estas aŭ turo aŭ arbo ; sur la turo staras tri kavaliroj ; piede de la arbo unu monako frapas la trunkon per hakilo dum la alia, pli supre, senbranĉigas la arbon. La litero **Q** estas ofte uzata : ĝi komencas la latinajn konjunkciojn kaj rilativojn ; ĝi entenas pitoreskajn scenojn : jen du komercistoj, kiuj klinigas super peco da drapo ; jen ĉas-sceno. Unu **S** konsistas en 4 bustoj de ĵonglistoj ; alia **S** estas draŝisto kun sia batanta draŝilo. Unu **A** ŝirmas la kreadon de Adamo. Malgrandaj scenoj estas intermetitaj en la teksto : estas la manĝo de Judita kun Holoferno, la arbo de Jese, la pendumo de Adamo. La vivo de la reĝo Davido okupas tutan paĝon ; ĝi estas vera « desegnita bendo ».

En la Leteroj de Sta Jeromo, la homa vizaĝo preskaŭ tute malaperis. La frontispico kaj la 140 inicialoj estas ornamitaj je plektaĵoj. En S-ta Benigne, Diĵona abatejo, la miniaturoj estas el dika guaŝo, kiu preskaŭ tute kovras la pergamenon ; folio-oro estis abunde uzata. Sed en Citeaux, oro estis rara. La farbo, pli flua, estas tiu de la akvarelarto ; la blanka pergameno aperas ; la koloro servas por marki nur la ombrojn, la faldojn, unu detalon de la kostumo ; kelkfoje ĝi estas nur linio, plumstreko.

El la 1200 manuskriptoj de Citeaux, kiujn oni inventaris en 1480, 300 estas en la urba biblioteko de Diĵono.

CLAIRVEAUX

Bernard (1091-1153) iĝas monako de Citeaux en 1112. En 1115 li fondas la abatejon de Clairveaux. Li verkas la statutojn de la Templanoj. Liaj miregaj kapabloj, lia inteligenteco, lia energio, lia aktiveco, igis lin unu el la grandaj eminentuloj de Mezepoko. Li konsilis la Papojn, kondamnigis Abelard, subtenis la polemikojn kontraŭ la abatejo de Cluny, en 1146 predikis en Vezelay la duan krucmiliton. Je sia morto, li estis fondinta 300 monakejojn.

La 25-an de junio 1115, Bernard forlasas la abatejon de Citeaux por instaliĝi en mallarĝa valeto ; arbaroj kovras la montetojn de tiu Klara Valo : estas Clairveaux. Bernard, kun deko da amikoj kaj parencoj, unue loĝas en lignaj kabanoj : unu el tiuj kabanoj estas la kapelo. En 1116 ili komencas konstrui firmajn murojn. En 1135 jam staras monakejo, sobra preĝejo, klostro kaj biblioteko kun la skribejo. En la 13-a jarcento la kopiistoj de Clairveaux disponas 14 tre malgrandajn ĉelojn. La religiuloj kopias Biblion kaj la Patristikajn Librojn, precipe tiun de S-a Aŭgusteno.



Bernard riproĉis al Citeaux la fantazion de ĝiaj skulptaĵoj kaj miniaturoj. Ĉirkaŭ 1125 li skribis : « Kion ĉi tie faras tiuj malpuregaj simioj,tiuj kruelaj leonoj, tiuj monstraj centaŭroj, tiuj makuletitaj tigroj, tiuj batalantaj soldatoj, tiuj kornantaj ĉasistoj ? Tie ĉi oni vidas strangaĵojn : unu nuran kapon sur 2-3 korpoj ; alie unu nuran korpon portantan du-tri kapojn. Oni pli facile admiras ĉion ĉi ol oni meditas pri la Leĝo de Dio ».

En 1151, en siaj « Statuta Generalia », Bernard postulis pli grandan simplecon en la dekoracio de la manuskriptoj. Li malpermesis la reprezentadon de la bestoj kaj eĉ tiun de la homa persono (krom por S-a Aŭgusteno). Li malpermesis ankaŭ la vivajn kolorojn en la preĝejoj, ĉe la kapiteloj, la vitraloj, la tapiŝoj. Pro la malriĉeco de la abatejo, li malpermesis la oraĵajn bindaĵojn kaj la miniaturojn kun ora fundo.

La Cistercianoj de Clairveaux kreis stilon sobran, senfantazian, sed tamen indan je la verkoj, kiujn ili ornamis.

La 340 volumoj de Clairveaux estas de impona formato ; ĝenerale 46 × 44 cm. La Granda Biblio (6 volumoj ellaborita en 1151, kaj kiuj bezonis la pergamenon de 300 ŝafoj) mezuras 50 × 36 × 8 cm.

La 10 « Opuscula » de Sa Aŭgusteno estas 48 × 43 cm. Kelkaj libroj estis kovritaj per kruda cervo-haŭto sur kiu la haroj ankoraŭ nun montriĝas.

« La literoj estu el unu koloro » diris Bernard.

La minuskloj, 6 mm altaj, estas el nigra inko sur tre blanka pergameno. Komence de paragrafo, la 3-centimetraj inicialoj estas aŭ bluaj, aŭ ruĝaj, aŭ verdaj, aŭ okraj ; ilian puran kaj elegantan desegnon kelkfoje plilongigas stiligitaj lilifloroj. La titolon reliefigas la sobraj majuskloj, kie alternas bluo kaj ruĝo. Sur kvadrata aŭ rektangula fundo la grandaj 8-10-centimetraj inicialoj komencas ĉiun Libron de Biblio ; ilin ornamas geometriaj desegnoj : volutoj, palmetoj, cirkloj, trianguloj, meandroj, medalionoj, laŭbornamoj, plektaĵoj. Sur fundo oranĝkolora, granatkolora aŭ intense blua ĉiu granda litero estas unukolora sed montras ĉiujn nuancojn de bluo, ruĝo, verdo, flavo kaj malvo.


En tiu abstrakta dekoro, la altaj inicialoj randas 2-3 liniojn de la teksto kaj elvokas la purecon de la Gregoria kanto.

Tamen, la monako-artisto, kvazaŭ li bedaŭris la kimerojn kaj drakojn de la romanikaj kapiteloj, kelkfoje pentris leonkapojn sur literstango aŭ serpentkapojn por findesegni la **V** de **V**ocavit.

En 1145, la princo Henri, filo de la franca reĝo Louis la sesa iĝis novico en Clairveaux. Li alportis sian bibliotekon ; la manuskriptoj, sendube ellaboritaj en Pariza ateliero, estas de profana stilo. Sur ora fundo la grandaj inicialoj montras vivkolorajn volutojn, palmetojn, mozaikojn sed ankaŭ flugilhavajn monstrojn, drakojn. La bindaĵoj estas esceptaj : bruna bovido-ledo kovras la tabuletojn de la bindaĵo. Feraĵoj desegnas rozojn, kvarfoliojn, encirkligitajn plektaĵojn, preĝejportalojn kaj ankaŭ motivojn de la romanikaj kapiteloj : rajdanta reĝo, genuantaj maljunuloj : kaj la bovo, la aglo, la leono, simboloj de la Evangelistoj. Kaj : kimeroj, fantastaj birdoj, sirenoj.

Oni devus ankaŭ paroli pri aliaj famaj manuskriptoj. Tiuj de Normandio, de Limoges (videblaj en Sta Yrieix aŭ Parizo). Kaj tiuj de la Moza regiono, kiuj inspiriĝis je la oraĵarto kaj emajl-arto, kiuj prosperis tiam en tiu regiono. Kaj ankoraŭ pri multaj aliaj.

S. GUILLOT.



KULTURO KAJ LINGVO

PRELEGO PREZENTITA DUM REGIONA KONGRESO EN MARSEJLO

Tiun nokton mi multe viziis per mirindaj songôj. Jen la unua :

Dum la dudekunua jarcento finiĝis la granda industria revolucio. En Eŭropo (kiel en la tuta mondo) la lastaj kamparanoj forlasis la kampojn kaj envenis amase en la urbojn, kie ili fariĝis ĉenlaboristoj. Nur kelkaj grandegaj fabrikoj produktis sinteze hemiajn pilolojn por la nutrado. Ne plu ekzistis nia ebriige plensuka kaj sukplena vino, nur akvece aĉa fluaĵo. Eĉ la vorto « vinbero » ne enestis en vortaroj ! Ne plu estis arboj, floroj, herboj kaj oni desegnis ilin sur la betonaj muroj : tio estis arto ! abstrakta arto !

SED kelkaj riĉuloj, (eks) egburĝoj akiris kampojn kaj ilin kulturis ; baldaŭ denove kreskis arboj kaj floroj. Tiuj egburĝoj retrovis la arton de la pankuirado, la guston de naturaj fruktoj, kaj ili forlasis por ĉiam la urbegojn, en kiuj la urbanoj ludis kun elektronikaj ludiloj kaj amoris kun artefaritaj aliseksaĵoj !

Kaj poste, por vivi ĉiam trankvile en siaj kamparoj, la novaj mastroj ĉirkaŭbaris la urbojn per pikildrataj muroj, ili starigis observejojn kun maŝinpafiloj kaj ne permesis al la urbanoj eliri !

Finfine, protektitaj kontraŭ la trivialuloj, tiuj novaj aristokratoj kreis regionajn klubojn ege fermitajn en kiuj estis malpermesite paroli aliajn lingvojn ol :

Jen la provencan, jen la bretonan, tie la vaskan, tie ĉi la francan, ĉi tie la anglan kaj tiel plu, kaj eĉ en kelkaj lokoj estis permesite paroli nur la pure senneologisme klasikan ESPERANTON !

Je tiuj lastaj vortoj mi tuj vekiĝis : ĉu tia estos la estonteco ?

Sed pro laceco mi ekendormiĝis kaj vizie songis tiun duan historion :

Post la dumila jaro, okazis io mirinda : francaj deputitoj voĉdonis leĝon, ne PRI la instruado de Esperanto, sed POR la instruado de nia kara lingvo. Jes ! Vi bone aŭdis ! Kaj tiu leĝo ordonis instrui Esperanton al ĉiuj, kiuj volas ĝin lerni, kaj tio en ĉiuj lernejoj : de la infana ĝis la universitata !

Neniu historiisto povis sukcesi klarigi la kialon de tiu afero. Kelkaj klarigis tion per la granda varmego de tiu jaro ; aliaj verkis ke la prelegisto kun varmege koraj paroloj proponis tiun leĝon kaj subite li ne plu parolis franclingve sed en esperanto. Tuj post la aŭdo de sonoj tiel belaj kaj agrablaj, ĉiuj deputitoj voĉdonis tiun leĝon.

Certe ne unuafoje francaj deputitoj voĉdonis leĝon, pri kiu ili konas eĉ ne unu vorton, sed tio ne notindas.

Kia ajna la kialo, tuj la instruado de Esperanto estis organizita, kaj tio en la plej bonaj kondiĉoj ! Ĉar apenaŭ kredeble ! Ne sufiĉas la instruistoj ! La malnovaj esperantistoj ne plu sin sentas frenezuloj, malfortuloj, membroj de ia sekto nomita Esperantismo, aŭ eĉ de ia sankta religio nomata Esperanto !

Ne ! finfine ili venke eniras en la mondon, en la vivon !

Kaj la oficiala rekono de la lingvo ekmalkaŝis ĝian belecon, ĉiujn ĝiajn kvalitojn kaj eblecojn. Oni ne plu parolis pri la greka lingvo ; la latina fariĝis kiel la ŝumera.

Kaj en la tuta mondo estis voĉdonitaj samaj leĝoj ; la angla lingvo kaj la franca kontraŭstaris iomete, sed kion fari ? La rusa, la ĥina batalegis, sed ĉie venkas la nova lingvo. Nun, pli kaj pli la gepatra lingvo estos Esperanto, kaj oni lernis iun ajn el la antikvaj lingvoj (franca, angla kaj tiel plu) nur pro kaj por plezuro !

Kaj en tiu bela tago, profetita de nia samideano Zamenhof, montriĝas, ke ne ekzistas jam plu nacioj kaj lingvoj naciaj, sed ekzistas nur unu ĉiuhoma familio kun unu ĉiuhoma lingvo.

SED KIO DO OKAZOS ? Tio estas la ĉeftemo de mia prelego, kies titolo estas « Kulturo kaj lingvo ». Sed antaŭ ĉio mi difinas la vorton « kulturo ».

Por mi KULTURO estas demando pri la homo, ĝi estas nepre ligita al homo, ĝi estas la *aktiveco* de l'homo. Antaŭ kelkaj jardekoj nur, teorio pri la kulturo estis studata, nun pli kaj pli la praktikado estas travivata ; jes ! kaj ne nur lerneje, enlibre konata !

KULTURO ne plu estas, kiel antaŭe, esprimo de la nura supera intelekta vivo de l'homo : religio, arto, filozofio, politiko kaj sciencoj.

La hodiaŭa kulturo estas la viva esprimo de ĉiu homo, esprimo de vivo de ĉiu homgrupo ; ĉar la homo ne vivas tutsimple en la naturo, senĉese li *ŝanĝas, modifas ĝin.*

Do en la kulturon ni povas enkonduki ĉiujn homajn aktivecojn : morto, vivo, sekso, manieroj manĝi, terkulturi, ĉasi, krei ilojn, vestojn kaj tiel plu.

Kulturo ne plu estas nur kolekto de kulturaj aferoj en muzeoj, bibliotekoj kaj universitatoj, sed kulturo estas, ekzemple KIEL eduki niajn gefilojn, kiel ami kaj amori, kiel esti civitano, kiel profesii kaj tiel plu.

Kulturo, do ne devas esti posedaĵo de elito, kiu kelkfoje disŝutis pluve kulturerojn al la amasoj.

Ne ! hodiaŭ kulturo estas por ĉiuj, ĉiu homo respondecas pri la estonto de nia mondo.

La homo, de nun, devas kaptis la fortojn de la naturo kaj agi kontraŭ ilin.

Kiuj estas tiuj naturaj fortoj ?

Vento, suno, neĝo kaj tiel plu sed ankaŭ la sociaj strukturoj, la teĥniko, la sekceco, la sanktaĵoj, unuvorte ĉio, kio influas nin !

La homo ĉiam pritaksas, prijuĝas tiunj ĉi fortojn. El tiu pritaksado naskiĝis moralo, religio kaj sciencesploro.

La homo ĉiam estas ene de tiuj fortoj, sed ĉiam la homo eliras el tiu naturo por *juĝi* kaj *transformi* ĝin.

Ĉiam do estas streĉo inter la transcendeco, kiu estas malfermiĝo al io super ni, akcepto de tiu io, kiun Zamenhof nomas « FORTO MISTERA », kaj la imanenteco, kiu estas fermiĝo,neakcepto kaj rifuzo de alio.

Alivorte, la homo akceptas aŭ ne la tradician kulturon ; ĉiam lukto inter la konservemaj ĝisostuloj kaj la futuristoj !

Nun mi volas skemigi al vi la kulturevoluon

Mia modelo konsistas el tri fazoj :

— mitologio
— ontologio
— funkciismo

Unue, mitologio !

En mitologio la homo kun la fortoj konstante interrilatas, ĉiam ili interpenetriĝas. La homo ne estas ankoraŭ individuo, li vivas nur rilate al la grupo, al la parencaro ; li ne konas la historion.

Por ilustri tion mi citas eltiraĵon el la « Lanternisto » de Svenkievicz (Ŝjenkjeviĉ) tradukita de Kabe :

> « En konstanta izoleco kaj ĉirkaŭita de naturo simpla kaj grandega, li komencis perdi la senton pri sia propra aparteco ; li ĉesis ekzisti kiel persono kaj kunfandiĝis pli kaj pli kun la naturo. Fine, ŝajnis al li, ke la ĉielo, la akvo..

Ĉi ĉio estas granda unuaĵo kaj unu granda miriga animo ;kaj sentas tiun animon, kiu vivas kaj kvietiĝas. »

Sur la kampo de la lingvo, mitologio forte influas. Post la disfalo de la Babela Turo, ĉu oni ne trovas multajn klopodojn serĉi la lingvon parolatan de Adamo kaj pere de tio retrovi la Perditan Paradizon, la Oran Aĝon, la sàĝan Naturon !

Ĉu unu ero de nia lingvo Esperanto ne estas mitologia ? Mi citas : « Kian grandegan signifon havus por la homaro la enkonduko de unu komune akceptita lingvo internacia... falus la hinaj muroj — kaj la popoloj interproksimiĝos kiel unu familio ».

Sed, gesinjoroj, ekzistas malbona flanko de la mitologio, tio estas la MAGIO !

La magio volas utiligi la kontakton kun la naturaj fortoj por manipuli la homojn kaj la fortojn. Se mito estas harmonio kaj humileco, magio estas aroganteco kaj potenco ! Kun la magio venas la tempo de la sorĉistoj kaj tiu de la pastroj.

NUN oni povas diri : magio estas altrudo, submeto de la amasoj fare de kelkaj ; magio mallarĝigas la vastan horizonton de l'mito, magio nur rigardas la agadon kaj la potencon !

Ĉu demagogiaj reklamoj nuntempaj kaj eĉ ekologiaj ideoj, kiuj enhavas bonajn mitajn kvalitojn, ne estas magiaj ? Ekzemple :

— Restu ĉiam juna !
— Venku la maljuniĝon !
— Virinoj ! Firmigu vian bruston !
— For la novaj energioj !
— Vivu la senenergia mondo !

Kaj ĉu ne estas magio en la naturalisma skolo de l'interlingvistiko ? Por mi, jes ! Ĉar iam furiozis la latina lingvo, ĉar onidire ĝi estas la plej perfekta, ĉar ĝi estis kaj estas la lingvo de la elito, se vi volas partopreni al la kulturo de tiu elito, vi devas lerni, se ne la latinan, almenaŭ la planlingvon « Interlingua ».

Ric Berger diris : « Ricevinte klarigon pri etimologio de iu vorto, homo ricevas ion utilan al sia kulturo ». Li tute malpravas ! Unue li kunfandas kulturon kun nur latina kulturo, kaj due li estas magiisto. Kial nur la latina vorto kun sia senco kaj la tuta historio de tiu vorto povas iel utili al la nuna uzado de la nuna vorto ? MAGIO !

Tio estas la antikva sentenco « nomen omen » (en la nomo estas la sorto).

Eĉ Virgilio diris, ke pere de formulo aŭ verso oni povas malsuprenirigi la lunon el la firmamento. Kaj la hina poeto TUFU ŝtelis sekretojn de la dioj per kunmetado de ideogramoj !

En indiana grupo, ĉe la naskiĝo de homo lia patrino donas al li du nomojn — la unua estas lia propraĵo — la dua estas por la grupo.

Neniam oni devas diri la unuan ĉar tion farante oni ŝtelas iom de lia vivo — Ne MIRU ! Ĉu nun la virinoj diras siajn aĝojn ? Kaj ĉu la anstatauigo de Zamenhofa vorto per neologismo ne estas plorinda, terura, abomeninda afero ! MAGIO !

Ĉu ne magia ankaŭ tiu interparolado ĉe kuracisto :

— Mi havas dentodoloron.
— Bone, vi suferas pri odontalgio.
— Mi havas kapdoloron.
— Negravas : estas cefalagio.
— Mi malbone digestas.
— Nu ! estas nur dispepsio.
— Ĉu gravas ?
— Ne ! ĉar nun vi konas la nomojn de viaj malsanoj !
— Ĉu mi forpasos ?
— Tute ne ! Sed mi plezure nekrologos pri via interesa kazo !

Por liberiĝi, sendependiĝi de la magiistoj, la homoj alvenas al la dua fazo de la kulturevoluo, kiu estas la ONTOLOGIO.

Kiel la mito, la ontologio donas sencon al la homa vivo, ĉar trovante leĝojn pri la homa naturo kaj la naturaj fortoj, la homo ne plu timas ilin. Sed, male de la mito, ontologio malkovras la identecon, la individuecon.

Ĉar por bone klarigi la konceptojn, la homo en tiu ontologia fazo, difinas ilin kaj por tion fari la homo apartigas la konceptojn ; li eksteriĝas de la studataj objektoj.

Vi bone konas tion : en tio konsistas la tuta scienco, eble la plej grava atingo de la homa aktiveco.

Do mi rekte iras al la malbona flanko de la ontologio, kiu estas SUBSTANCISMO (aŭ substancialismo). Se la ontologio estas klopodo nove rilati kun la fortoj, kaj por studi ilin, la ontologia homo eksteriĝas de la studobjektoj, la substancismo faras de tiu distanco grandan abismon ; tiamaniere substancismo fiksas ĉiujn aĵojn en si mem, ĝi ne plu vidas rilatojn inter ili.

En tiu mensostato la homo kredas, ke realeco estas nur interne de liaj difinoj. Do tiu homo fiksas rigide la realecon.

La substancismo ankaŭ fiksas la religiajn kaj la filozofiajn doktrinojn, ligas pere de eternaj leĝoj la politikajn sistemojn kaj la moralajn agojn. Ĝi katenas la homon kaj la mondon pere de formuloj pruntitaj de la siaepoka scienco.

La homo estas nur sklava imitanto de veroj kaj verkoj porĉiame ellaboritaj ! Sur la tereno de la lingvoj, tio estas fiksado unu fojon por ĉiam de la lingvo !

Ekzemple oni nur devas studi kaj imiti Ciceronon. Nur li prezentas la klasikan latinan prozon. Post li, dekadenco !

Nu, francaj gesamideanoj, vi parolas *dekadencan lingvaĉon.*

Nu ! Kion diri pri Esperanto ? Vi certe konas la respondon de sinjoro de Reynold : « Esperanto estas nur kaŭzo kaj efekto de la inteleкta dekadenco ».

Mi volas ankaŭ aldoni pri esperantologio kaj esperantologoj. Ili pritraktis la vorton « INO » laŭ siatempaj lingvistikaj esploroj, kaj do « ino » estas morfemo, leksemo, vortero, sufikso, sufiksoido, finiĝo, finaĵo kaj tiel plu. Sed INO estas MAMSTARA, pardonu MEMSTARA vorto !

Kaj nun mi legas eltiraĵon el « Lingvo kaj vivo » :

... « Al tiuj longvidaj teoriistoj (kiuj neas la evidentan gramatikan karakteron de la radikoj) mi emus respondi per jena dilemo :

— aŭ viaj teorioj kondukas Vin al postulado de ekzistorajto por formoj kontraŭaj al la nuna uzado... kaj tiam ili estas *senvaloraj* ;
— aŭ ili kondukas al la pravigo de la nun uzataj formoj kaj tiam ili estas *senutilaj,* ĉar tiujn formojn jam bone klarigis la klasika analizo »...

Leginte tion, mi tuj pensis pri la vortoj de la fama kalifo Umar la unua, kiu bruligis la grandegan bibliotekon de Aleksandrio. Mi citas : « Se ĉiuj ĉi librojn diras la samon, kiel la (klasika) Korano, ili estas *senutilaj* ; se ili diras alion, ili estas *(senvaloraj)* mensogaj kaj do detruendaj ».

Sed ĉu ne Zamenhof skribis :

— tro granda severeco kaj katenado estas superflua kaj
— plena detala gramatiko ne sole faciligus la lernadon de la lingvo, sed *terure ĝin malfaciligus.*

Jes, post magio, substancismo kreas la mallibere jon por la kreemaj homoj ; substancismo donas al

la socioj sistemojn ege fermitajn kiel la feŭda, la kapitalismo aŭ tiuj sistemoj submetitaj al prema disciplino de unu partio.

Kiam religio de kontakto kun *Dio* fariĝas KONTRAKTO.

Kiam feliĉo igas fetiĉo.

Kiam plezuro iĝas mezuro.

Nepre devas veni la tempo de *funkciismo*. Estas hodiaŭ.

FUNKCIISMO estas pli sinteno ol teorio. La funkciisma homo serĉas rilaton, ligon, partoprenon. Li deziras nek distancon, nek puran objektivan konon. Li volas partopreni kun sia emocia forto, sia viva impeto. Li deziras koni la KIALON, sed la KIELON pli ŝatas li. Li vivas streĉe, strebe, pene kaj sopire. La funkciisma homo, ekzemple, demandas al metafizistoj :

« Kiam vi uzas tiujn grandegajn vortojn, kiel DIO, AMO, LIBERECO, kiaj estas iliaj signifoj rilate al viaj Agmanieroj ? Ne difinu ilin abstrakte, sed kiel tiuj vortoj *efikas* en viaj vivoj ? »

« Sur la tereno de la lingvoj : tion majstre diris Zamenhof : « Griza estas ĉiu teorio, la praktiko estas la plej grava ! » ».

Sed ekzistas malbona flanko de tiu moderna pensmaniero. ĝi estas la *operaciismo*. Ĉar. ĉiam demandi « KIEL » povas konduki al nura ilo, instrumento uzata tute arbitre. La operaciismo transformas en absoluton la agmanierojn, kiuj iĝas nur operacioj !

Mi klarigas tio per ekzemploj :

La fama filozofo Wittgenstein imagis jenan ludon :

Iu, en homprupo, post rigardo, enmetas en skatolon, majskarabon. Li fermas la skatolon kaj donas ĝis al sia najbaro priskribante la beston ene de la skatolo. La najbaro ne vidante la beston priskribas ĝin al apuda najbaro, kaj sinsekve. La lasta ricevas skatolon kaj priskribon de la besto. Ĉenludo !

Sed nun la filozofo demandas al vi ĉiuj :

« Se ne estus majskarabo en la skatolo, la ludo estus la sama, la operacioj samaj ; do tiumomente la majskarabo ekzistas nur pere de la operacioj kaj tute ne ekzistas en la skatolo ! »

Kiam teologoj parolas pri Dio, ĉu Dio ne eksistas nur pere de ilia fluego de paroloj kaj nur per iliaj difinoj ? Dio ne plu estas realaĵo intima.

Kiam la psikologoj parolas pri la homo : ĉu la homo en iliaj cerbujoj ne fariĝas nur serio de reguloj science konstruitaj nur el la vido de la homa konduto ?

Kiam en malsanulejo fakkuracisto funkciigas komputeron pere de donitaĵoj prenitaj sur malsanulo per elektraj fadenoj, li donas ordonoj nur per la respondoj de la komputero, kiu kalkulas, kalkulas kaj la fakkuracisto daŭre liveras sanigajn receptojn sed jam de longe la malsanulo mortis !

Kaj sur la seksa tereno, bona estas la forigo de la tabuoj, sed ĉu amoro kaj amo estas nur mehanismoj, alivorte en futurisma Esperanto AMORI ĈU AS NUR TRIDEKSEPGRADE ENEN KAJ ELEN INGI ?

Kaj sur la lingva tereno, ĉu IDO ne mortis ĉar ĝi volis operaciigi la lingvon ? Redukti la lingvon al nur matematikaj operacioj, al la tiel malbonfama principo de returnebleco ?

Sed atentu ! ĉu niaj gramatikistoj ne volas kateni la lingvon per operaciaj leĝoj eternaj ?

Kaj finfine ĉu mia parolado ne konsistas nur el miaj aĉaj elcerbumaĵoj ?

DO se ni volas resti homoj, se oni ne volas esti nur marko aŭ etiketo, nur vektoro aŭ punkto sur unu logaritma aŭ komputila tabelo ni devas konscii ke *ni neniam atingis definitivan staton*. Sed ni klopodu ĉiam al malfermiĝo al studo kaj akcepto de la valoroj de la aliaj.

Zamenhof diris pri Esperanto, sed ĉu ne por ĉio :

« La Esperantistoj komprenas tre bone, ke lingvo povas disvolviĝi nur per singarda vojo de natura EVOLUCIO ,sed ĝi tuj mortus se oni volus ĝin disvolvi per kontraŭnatura kaj danĝerega vojo de REVOLUCIO ».

Tamen Zamenhof konsciis ke : « la tutan nian altan kulturon kaj civilizacion ni dankas nur al unu objekto : al la posedado de lingvo.

Kaj Zamenhof faris la plej grandan revolucion : li donis Esperanton al la mond'.

Sed li aŭdis *la saĝajn homojn* diri : tio estas infanaĵo ĉar ili mem ne okupas sin pri tio ! kaj li aŭskultis *la spertajn homojn* sentenci : la antaŭuloj ne faris tion do estas utopio. Ankaŭ li vidis *la sciencajn homojn* pruvi : lingvo estas afero tute natura kaj nur natura. Kaj *la rutinaj homoj*, kiuj ĉiam ne pensas pli laŭte ol la aliaj kriis : Esperanto estas sensenca infana fantazio ! Kaj nun *la praktikaj homoj* admonas lerni la *anglasonan* lingvon

— ADMONO AL MONO —

« Ho frazo, frazo, frazo, kiam vi ĉesos regi super spiritoj de la homoj ! » koleris kamarado Zamenhof.

Sed, gesamideanoj, mi diris al vi ke kulturo estas transformo de la naturo, kaj fakte ĉu la homo estas por la lingvo aŭ lingvo por la homo ?

Kaj kiam, nuntempe, sen Esperanto, ni akiras kulturon, ĉu tiu kulturo ne estas esence ligita al nur unu socia klaso kaj nur unu nacio ? Esperanto plilarĝigas tiun kulturon ; oni eble diras : tio ne povas esti do Esperanto ne lernindas kaj ne lernendas !

Sed ĉu baldaŭ ne estos nur unu kulturo : la USONA kulturo ! kaj kia kulturo ? MONOKULTURO !

Oh ! Jes vera la diro de Marks :

« La tradicioj de la mortintaj generacioj multe pezas premsonĝe sur la cerboj de la vivantoj ».

Sed la eco de la homo estas ĉiam krei novajn kulturojn — kaj la devo de la homo estas ankaŭ ne resti malliberigita en tiuj lastaj, li devas ĉiam sin demandi kiel li rilatas kun tradicio kaj kulturo. Por tio helpas lin Religio, Filozofio, Sciencoj kaj Arto, sed atentu *ĉiu* el ni devas eniri en tiuj sferoj por partopreni al la konstruado de la nova ĉiuhoma mondo.

Nun, Esperanto estas la plej bona ilo por tio !

Ĝiaj multfacetaj aspektoj :

— mitologia : unu ĉiuhoma familio ;
— ontologia : ĝiaj lingvistika kaj interlingvistika valoroj,
— funkciisma : ĝia fleksebleco, ĝia alproprigo de ĉiuj homoj el ĉiuj sociaj klasoj, ĝia ne altrudo al la popoloj kontraŭe al la imperiismaj lingvoj franca, angla, rusa kaj ĉina.

Jes tiuj aspektoj de Esperanto esperigas nin pri ĝia venko.

Sed atentu ! Venko de Esperanto devas esti venko de la interna ideo, de la plibonigo de la homaj interrilatoj kaj de la novaj popolaj interkonsentoj. Kaj por tio, ne sufiĉas nur la venko de la lingvo. Ne forgesu la vortojn de Samideano Janton :

« *Esperanto estas lingvo kaj mesaĝo* »

Estas pli facile enkonduki lingvon ol mesaĝon, ni havas ankoraŭ multe da laboro !

Ne kredu, ke post la venko, ni, samideanoj nuntempaj, disiĝos malfrate, NE ! kunfrate eĉ pli ol nun, ni devos kun ĉiuj aliaj homoj krei la novan mondan civilizacion.


Ne timu tiun perspektivon.

Nune, lasu la aliajn planlingvojn al la VERMOJ DE L'MORTO kaj flegu nian karan lingvon per VARMOJ DE L'ARTO.

Michel CHALLULAU.

POR VIA DISTRO

Vort-enigmo



Horizontale

A — Adverbo responde al « ju ».
B — Faruno knedita kun akvo.
C — Ĉirkaŭaĵo de vilaĝo.
Ĉ — Prilaboras lignon en konstruo.
D — Plenkredo — Perpieda moviĝo — Modifita stat' de oksigeno.
E — Homoj el fremda lando.
F — Plende krios — karakterizitaj per moka esprimmaniero — Malgranda kokinprodukt'.
G — Partoj de poemo — frakci' de benzino — subite montriĝis.
Ĝ — Pingloarbo — En alta grado — Gaso en lumreklamiloj — Grenkampa herbaĉ' — Unuo, difinita kvant'.
H — Interosta juntaĵ' — Elektra ŝarĝita molekulo — Femala — matura knabo — aŭdeblus.
Ĥ — Vidu 11 vertikale.

Vertikale

1 — Finaĵo de la aktiva prezenco.
2 — Internacia prefikso.
3 — Travidebla rompebla substanc'.
4 — Atingi difinitivan lokon — Mallongigo de volto.
5 — Ofta metal' — vicmontra numeralo.
6 — Estis en glaciiga stato.
7 — Ne variebla poseda pronomo — Altvaloraj metaloj.
8 — Metala element' — Urbo en G.R.D.
9 — Duo — Sufokiĝ' en akvo — Mezurum' de elektra rezistanco.
10 — Malpliigi la kordvibradon — Difinita part' de spaco — Germane unu.
11 — + Ĥ = kaŝita frazo — Simbolo de natrio.
12 — Facile faldebla metalo — Posedata de ni — Numeralo.
13 — Naŭdekgrada angulo — Danlandano — Vicdelegito.
14 — Rilataj al fekunda loko en dezerto — Alimaniere.
15 — Aŭdebla aervibrado — Hejma best' grasigata por homa nutrado.
16 — Mallongaj prozaj literaturaj verkoj.
17 — Junulara esperanto renkontiĝo — Aŭtosimbolo de Usono.
18 — Portebla ligna kuvo — Aŭtosimbolo de Rumanio.
19 — Intima korpoparto.
20 — Senprokraste.
21 — Simbolo kemia de stano.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

◆◆◆◆

DEMANDAJ ADVERBOJ

Kiam — Kial — Kiel — Kiom — Ĉu

RIM : kiam ili enkondukas dependan propozicion, ili estas **subjunkcioj** — mi ne scias, kie ili estas.

Ajn alportas nedifinitecon : kiam ajn.

KIAM = en kiu tempo :

mi tute silentos, kiam li parolos — kiam ajn vi venos, mi kore akceptos vin.

KIAL = en kia kaŭzo,

motivo : kial ne ? jen kial mi ne venis. Kial ajn vi plendos, oni ne kredos vin.

KIE = en kiu loko

kien vi kuras ? neniu scias de kie li venis. Kien ajn vi iros, vi trovos taŭgajn bankojn.

KIEL = en kia maniero

kiel interese ! li estas punita, kiel li meritas — kiel ajn malmulte li pagos, mi estos kontenta.

KIOM = en kia kvanto

kiom ĝi kostas ? Kiom da homoj, tiom da gustoj — kiom ajn multe vi batos la azenon, tiom ĝi ne pli rapidos.

ĈU

esprimas demandon pri jeso aŭ neo — ĉu vi trovis la gazeton ? Ĉu vere aŭ ne ? Ĉu estis aŭ ne estis ?

Maljusteco :



Kial vi riproĉas min ? Ne estas mi la kulpanto ? ĉar li estis la gasto, mi volis plezurigi lin kaj mi nomis lin golulo. Mi ne pensis, ke li estas nekapablulo.

Mem-edukado :



— ĉu vi ne rimarkis, la foreston de via filo ?

— Ne, tute ne ! Ha, jen kial la najbaroj parolis pri agrabla silento !

Cetere, vi bone scias : obeado kaj kontrolado estas nur diktatoraj konceptoj, kaj ni tute ne volas traŭmatizi nian karuleton.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichs trasse, 2, LINZ (170 aŭstr. ŝil.).
Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (330 fr.).
Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (5,00 pundoj).
Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregards vej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (65 kr.).
Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivis töntie, 05510 Hyvinkää 51 (44 mk).
Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).
Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Av da Salamanca 42-10° - D ALICANTE (650 pes.).
Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (12 us. dol.).
Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Gorizia 17, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (8000 liroj).
Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).
Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).
Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoons traat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (22 guld.).
Norvegujo : S-ino Louise Bœ Maridalsveien 128 A OSLO 4.
Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima) (12 us. dol.).
Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (12 us. dol.).
Svedujo : Eldona Societo Esperanto, poŝtkonto 596768-2 216.11 Malmö (45 kr.).
Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (22 fr.).
Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).
Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 12 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 1 de 1981, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Les travaux intérieurs prévus pour cette année sont terminés. Tout au moins en ce qui concerne la plâterie, la menuiserie, l'électricité et l'installation sanitaire. Mais il reste encore, et c'est un gros travail, à faire la peinture et la tapisserie. Cela aura lieu après la rencontre des enfants en avril, avec des équipes de volontaires compétents. Le chauffage d'une partie des communs sera réalisé pour le printemps.

Mais Grésillon ce n'est pas simplement une ou des constructions à entretenir, à rénover, à moderniser. C'est aussi une grande propriété à laquelle nous n'avons pas pu, jusqu'à maintenant prêter suffisamment d'attention. Les arbres, eux aussi, vieillissent et demandent à être remplacés. C'est pourquoi la peupleraie qui donnait des signes de fatigue et dont certains éléments étaient à la limite de la disparition a été abattue. Le prix de vente des arbres a été aussitôt réinvesti pour une plantation d'une centaine de jeunes peupliers, en particulier dans les parties les plus humides de la propriété. Cette plantation doit être réalisée en février. Le terrain est en grande partie nettoyé, ce qui ne s'est pas fait sans difficultés.

Le bois, lui aussi, souffrait d'un manque d'entretien. Quelques beaux arbres n'arrivaient pas à respirer, car le nombre des rejets et la densité des broussailles les en empêchaient. Ce défrichage est commencé. Seuls vont rester les arbres en bonne santé, et place nette est faite pour une replantation l'an prochain. Ce travail va probablement durer jusqu'en avril. Il est fait par des personnes que le bois de chauffage intéresse, et il est contrôlé par un spécialiste des Eaux et Forêts. Il était nécessaire.

L'environnement du château se modifie ; en bien, nous le pensons, même si, provisoirement, certains coins vont paraître un peu dépeuplés. Vous serez nombreux, j'espère, à en juger cet été. Les inscriptions fermes nous arrivent déjà assez nombreuses et les demandes de renseignements suivent le cours habituel. Les équipes d'animation de cet été ne sont pas encore au complet, car il semble que Brasilia exerce une grande attirance. Mais la mise au point définitive n'est, nous l'espérons, qu'une question de semaines.

Je terminerai par la recommandation habituelle qui, d'année en année, devient plus impérative. N'attendez pas pour vous inscrire à l'un des stages de cet été. Les difficultés de logement risquent de se présenter encore cette année, dès avril ou mai.

P. BABIN.

INTER NI

La projektitaj laboroj, interne de la kastelo, estas finitaj, almenaŭ koncerne la riparadon de la plafonoj, la vandoj kaj la elektro-instalaĵoj. Restas nun granda laboro farota : farbado kaj tapetado. Tio okazos tuj post la Infan-renkontiĝo, en aprilo, fare de kompetentaj volontuloj. Ni esperas, ke la hejtado de la eksteraj konstruaĵoj estos realigita por la printempo.

Sed Grésillon ne estas nur prizorgotaj, renovigotaj, modernigotaj konstruaĵoj. Ĝi konsistas ankaŭ el granda bieno, kiun ni ne povis sufiĉe prizorgi ĝis nun. Ankaŭ la arboj maljuniĝas kaj bezonas anstataŭantojn. Pro tio la poplaro, kiu ŝajnis « laca », eĉ, laŭ la aspekto de kelkaj arboj, baldaŭ mortonta, estis dehakita. La vendoprezo de la arboj estis tuj reinvestita en la plantado de cento da junaj poploj. La tereno estas jam liberigita je la branĉoj forlasitaj de la arbohakistoj en la koto. Ne facila laboro.

Ankaŭ la arbaro suferis pro manko de prizorgado. Kelkaj belaj arboj estas en danĝero de morto pro la neebleco de spirado kaŭze de la nombro da arbetoj senorde kreskantaj. La senveprigado komenciĝis kaj daŭros ĝis aprilo sub la kontrolo de specialisto. La replantado okazos venontan jaron.

La ĉirkaŭaĵoj de la kastelo modifiĝas. Eble kelkaj lokoj estos iom « senpopolaj » dum unu jaro. Sed tio estis farita por la bono de la arbaro mem. Multaj geamikoj povos juĝi venontsomere pri la nova, provizora aspekto de la pejzaĝo. Jam multaj petis informojn kaj kelkaj dekoj aliĝis. Do, kiel kutime ni diros :

Ne atendu. Aliĝu tuj !

LE PRINTEMPS A GRESILLON

29 Mars — 5 Avril

— Rencontre internationale d'enfants

— Pédagogie pratique

(demander le programme détaillé)

1 — 2 — 3 Mai

— Séminaire de pédagogie organisé par U.F.E.

LES CONFERENCES DE LA PREMIERE PERIODE D'ETE

Voici quelques titres :

— L'Islande

— Les Iles Canaries

— L'Orient au seuil de l'Occident

— Les origines de l'Europe

Ces conférences seront faites par

HUGO ROLLINGER

D'autres titres seront publiés dans le prochain numéro.

POUR ANIMER VOS REUNIONS DE GROUPE
A PARTIR DE TEXTES VIVANTS, ET MAGNIFIQUEMENT TRADUITS,

NORMANDAJ RAKONTOJ — DE GUY DE MAUPASSANT

traduit par Roland DUPUIS

210 pages, relié pleine toile
Ilustrations originales de Robert A. PINCHON

PRIX : 36 francs

Réduction à partir de 3 exemplaires

PARTICULIEREMENT ADAPTE
A VOS COURS DE PRATIQUE

UTILISE DANS PLUS DE DIX PAYS

"POR LA PRAKTIKANTOJ"

PLUAJ PAŜOJ AL PLENA POSEDO

prezo : 22 francs

Rabato por mendo de pli ol 5 ekzempleroj

Mendoj al nia LIBRO-SERVO

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon, noir	:	0,80
couleur	:	1,00
Cuillères de collection	:	25,00
Pendentifs	:	20,00
Porte-clés	:	20,00
Coupe-papier	:	35,00
Thermomètres voitures	:	35,00
Etoiles pour vitres de voitures	:	4,00

Pensez à acheter :

FALSAJ AMIKOJ

en Esperanto

de R. Bernard et A. Ribot

3,50 F. (+ port : 4,45 F.)

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 80,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 80,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 50,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

à M. CIRET

« La Timeraie »

VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE

C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 80 Fr.

LES EXTRAITS DE NOTRE CATALOGUE

...aujourd'hui

PAŜOJ AL PLENA POSEDO

(4e édition)

de **William AULD**